BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

AÑO VII N.° 10 (94) OCTUBRE, 1956

OTRO PELDAÑO

Aún no se ha extinguido el eco de las salvas de aplausos de los congresos de Zaragoza y Barcelona; aún está fresca la tinta de los numerosos periódicos y revistas que refirieron con unanimidad de elogios, lo que fueron ambas reuniones esperantistas; y, probablemente, nunca se extinguirá, en el corazón de cuantos a ellas asistieron, el recuerdo de aquella comunión internacional de habla, afectos y sentimientos.

La pujante evolución del movimiento esperantista acaba de producir, apenas terminados ambos congresos, una nueva manifestación de vitalidad, con motivo del recientemente celebrado Congreso de PAX CHRISTI, en Valladolid, que tuvo un gran éxito, tan solo empañado por la gran dificultad con que se tropieza en los congresos internacionales: la incomprensión idiomática. La traducción simultánea, en salas aparte, evidenció el inconveniente, y cuando llegó el período de observaciones, hechas en varios idiomas, la dificultad obligó a suprimir intervenciones, para no alargar desmesuradamente las sesiones. Además, los congresistas de países cuyo idioma no fué oficial en el congreso, debieron contentarse con agregarse al grupo de idioma más conocido, y si no conocían mas que el propio, perdieron lastimosamente su tiempo, nadando continuamente en la niebla de las conjeturas. Por ello, fué de gran interés la discusión de la solución esperantista, presentada por nuestro colaborador Jaime Juan Forné, el congresista francés Pierre Royer, y el alemán Max Mielert. La asistencia fué muy nutrida, y todos pudieron darse cabal cuenta de la facilidad con que se llevaron los debates y de las ventajas que reportaría el uso de un solo idioma para los congresos internacionales. Más que nuestros argumentos, la lectura de las

Texto de la resolución aprobada en el 4.° Congreso Internacional de PAX CHRISTI, celebrado últimamente en Valladolid

Los Congresistas de PAX CHRISTI, interesados en el problema de la lengua internacional, se han reunido los días 13 y 14 de Septiembre, con motivo de la «Jornada Esperantista», organizada en el cuadro del IV Congreso Internacional de PAX CHRISTI. La Jornada ha sido preparada por los enviados de la Unión Internacional de Esperantistas Católicos, de Vleuten (Holanda): D. Pedro Royer (París), Don J. Juan Forné (Valencia) y D. Maximilano Mielert (Munich), miembros de PAX CHRISTI.

El Comité, presentado por el señor Royer, enviado de la Liga Francesa de Esperantistas Católicos,

1.°) ha indicado los fines y la organización de I. K. U. E. (Unión Internacional de Esperantistas Católicos), insistiendo sobre el hecho de que esta asociación es un Movimiento Católico aprobado por S. S. el Papa Pío X. La Asociación tiene como objetivo la propagación de la fe católica entre los esperantistas y la introducción del idioma internacional Esperanto en los diferentes Movimientos Internacionales de la Iglesia.

2.°) ha expuesto la historia, los resultados obtenidos por el Movimiento y la estructura del idioma Esperanto.

3.°) ha dado todos los informes necesarios para que la concurrencia quedara claramente enterada de la esencia y del papel que el Movimiento Esperantista puede desempeñar, al servicio de la Iglesia.

Resolución

Los miembros de PAX CHRISTI, reunidos en la Jornada Esperantista, después de haber escuchado el informe del Comité, adoptan la siguiente resolución:

1.°) toman en cuenta los resultados obtenidos por el Esperanto en la esfera de los intercambios internacionales, de la literatura, de la ciencia y de la cultura.

2.°) quedan enterados de la existencia de una Asociación de Esperantistas Católicos (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) y reconocen la parcial comunidad de objetivos existente entre dicha Asociación y PAX CHRISTI.

3.°) consideran que los lazos establecidos entre I. K. U. E. y PAX CHRISTI deben ser mantenidos y aumentados, para provecho de los dos Movimientos.

4.°) animan a los miembros de PAX CHRISTI a aprender el idioma Esperanto y a participar en la Correspondencia Internacional en Esperanto, que es una nueva sección de la C. C. I. (Correspondencia Católica Internacional).

5.°) invitan a los católicos esperantistas a informar a PAX CHRISTI de los progresos y resultados de su Movimiento, cuyos informes pueden, eventualmente, ser publicados en los Boletines Nacionales de PAX CHRISTI.

---

conclusiones, que «Boletin» ofrece en esta misma página, demuestra el éxito de información y propaganda que el Esperanto ha tenido en un ambiente internacional; éxito que se repite siempre que se pone a prueba, y que tan solo pueden poner en duda quienes no quieren tomarse la molestia de observarlo.

Este triunfo constituye un nuevo progreso del idioma internacional, un peldaño más, conquistado en esa ascensión, firme y segura, hacia la comprensión internacional, premisa insustituible para lograr, juntamente con otras condiciones morales y sociales, la paz del mundo, que todos anhelamos. Por ello, ser esperantista y difundir el idioma internacional, es laborar, eficazmente, para un mundo mejor.

LA KONGRESO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Fine de julio okazis en Beograd, Jugoslavio, la 29-a kongreso de S. A. T., kiun ĉeestis ĉirkaŭ 600 delegitoj kaj gastoj el 19 landoj. La kongreson partoprenis la unuan fojon post la milito ankaŭ la reprezentantoj de orienteŭropaj landoj (Bulgario, Hungario, Ĉeĥoslovakio), kaj alvenis salutleteroj el Sovetio, Rumanio kaj Pollando.

Post Interfratiĝa Vespero sekvis merkredon la 25-an de julio solena malferma kunsido, kiun salutis krom la delegitoj de ĉeestantaj landoj ankaŭ la honora protektanto Ĝuro Salaj, prezidanto de Sindikata Unuiĝo de Jugoslavio, kiu interalie akcentis sian konvinkon, ke la reprezentantoj de la laboristaj esperantistaj organizoj per sia laboro kaj per sia starpunkto aktive partoprenas en la ĝeneralaj klopodoj, ke la interrilatoj de la homoj kaj de la nacioj estu bazitaj sur justaj fundamentoj.

La kongreson salutis ankaŭ la prezidanto de Jugoslava Esperanto-Federacio k-do Peter Zlatnar, kiu substrekis la aktivecon de jugoslavaj esperantistoj en S. A. T., montris la neceson de pli intima kunlaboro kun UNESKO kaj prezentis sugestojn por solvo de diversaj ideaj problemoj.

K-do N. Bartelmes en sia alparolo nome de SAT-Plenum-komitato substrekis la signifon de nia Beograda Kongreso kaj difinis la rolon de SAT en la kadro de la ĝenerala laborista movado.

Dum la Kongreso okazis en la kadro de Laborista Universitato kelkaj tre interesaj prelegoj: Soci-ekonomiaj rilatoj, la bazo por demokratigo de la vivo (Danĉika Nikoliĉ); Problemoj de instru-reformo en Jugoslavio (Prof. Boza Popoviĉ); Interlingvistiko kaj esperantologio (D-ro Jaromir Jermar); Kialo de S. A. T. (enkondukis A. v. d. Starre); Intersteno (Bozidar Vanĉik). Krom tio okazis fakaj kaj frakciaj kunsidoj de ISKKP, LEA-komitato k. a. Samtempe okazis la 3-a geknaba kongreseto, kiun ĉeestis 55 infanoj. La geknaboj vizitis interalie Kalemegdan, Pioniran domon, zoologian ĝardenon, radio-stacion, ekskursis al monto Avala, Smederevo kaj Novi Sad. La kongresanoj vizitis plurajn fabrikojn kie ili havis okazon konatiĝi kun la sistemo de laborista mem-administrado en Jugoslavio. Krom tio estis faritaj ekskursoj: al Smederevo, duontaga, kaj al Novi Sad, tuttaga. En ĉi tiu lasta urbo la vic-distriktestro akceptis reprezentantojn en la urbdomo.

La kulturaj aranĝoj de la kongreso estis sur alta arta nivelo. La membroj de la kultur-artista societo «Abraŝeviĉ» —la plej malnova serba kultur-artista societo, en lastaj jaroj multfoje premiita— prezentis la komedion «Suspektinda persono» de la plej fama serba komedioverkisto Branislav Nuŝiĉ, tradukitan de Antonije Sekelj. Kvankam kelkaj el la aktoroj komencis lerni Esperanton apenaŭ antaŭ du monatoj, tamen la lingvo estis tre bona, senriproĉa. Longa aplaŭdo rekompencis la lertajn artistojn; la kongresanoj rigardis sekve mallongan sed bonan nigra-blankan filmon kun esperantigita teksto.

La alia kultura aranĝo estis arta vespero, dum kiu la fervojista kultur-arta societo «Branko Cvetkoviĉ» el Beograd prezentis kantojn kaj dancojn de jugoslavaj popoloj. La dancistoj estis veraj majstroj, kaj la publiko regalis ilin per entuziasma aplaŭdo, postulante plurfoje ripeton de speciale belaj partoj. Pli ol 70-membra ĥoro kantis parte en Esperanto.

Sabaton vespere la honora protektanto de la Kongreso aranĝis solenan akcepton de esperantista delegitaro en la Domo de sindikata unuiĝo. La ĵurnaloj, gazetoj kaj radio ĉiutage informis tre detale pri la laboro de la Kongreso. «Veĉernje Novosti» ĉiutage aperigadis ankaŭ E-rubrikon. La kongresa Gazetara Servo funkciis perfekte. La Poŝt-direkcio lasis en la trafikon apartan kongresan stampon.

Dum la tria laborkunsido de la Kongreso estis unuanime akceptata la raporto de la P. K. kaj la propono, ke la sekvonta SAT-kongreso okazu en Rotterdam de la 3.a ĝis la 9.a de aŭgusto 1957. Estis unuanime akceptata ankaŭ rezolucio pri aferoj interesaj por la Asocio.

HISPANA KRONIKO

Tromulte da publikaĵoj malpermesis al ni en pasintaj numeroj aperigi ĉi tiun rubrikon. Ni petas pardonon, tial ke kelkaj raportoj estas jam iom malnovaj.

TABERNES DE VALLDIGNA (Valencio). S-ano Salvador Martínez Guillem la 22-an de Junio iniciatis serion da prelegoj pri Esperanto, antaŭ la mikrofono de Radio Valldigna, Paroĥejstacio de Benifairó de Valldigna. La interesa prelego de tiu samideano okazigis nombron da demandoj inter la aŭskultantoj, kiuj estis respondataj de S-ano Martínez Guillem la 29-an de Junio ankaŭ per la sama radiostacio, kaj tial ke aliaj demandoj de la publiko estis denove direktataj al la preleginto, li ree sin turnis al siaj aŭskultantoj per la elsendoj de la 6-a kaj de la 20-a de Julio. Bonegan propagandon faris la menciita samideano per tiuj prelegoj, kiuj daŭris 10-15 minutojn. Pro la sukceso de tiuj prelegoj, S-ano Martínez Guillem intencas inaŭguri Esperanto-kurson por ĉiuj interesuloj.

SABADELL. La hejmo de Gesamideanoj Mimó fariĝis vera nesto de esperantuloj. En pasinta Junio ili organizis serion da teatraj prezentadoj, kies aktoroj estis infanoj. La scenejo estis en la ĝardeno de Gesamideanoj Mimó, kaj la infanteatraĵoj prezentitaj estis «Neĝblankulino» kaj «Cindrulino». La etaj aktoroj majstre instruitaj de la esperantista paro, bonege ludis siajn respektivajn rolojn, plezurigante grandan nombron da spektatoroj, kiuj ĉeestis tiajn agrablajn teatrajn prezentadojn. La agado de Gesamideanoj Mimó estas vere gratulinda kaj imitinda, ĉar vekas ĉe la infanoj plezuron lerni Esperanton: ili prenas la lingvon kun la sama entuziasmo ol ili prenas siajn preferatajn ludilojn. La apuda foto montras scenon de unu el la prezentitaj teatraĵoj.



MOYÁ (Barcelono). Je la 9-a de Junio tiu urbeto travivis Esperantan vesperon. Oni okazigis kiel ĉiujare Kursofinan Feston, kiu tre alte brilis, speciale pro la ĉeesto, kiel honora gasto, de la germana samideano W. O. Schmalzriedt, patro de Sinjo, la fama esperantista knabino, kiu vojaĝis tra kelkaj landoj uzante nur la lingvon Esperanto, kaj pri kiu la tuta Esperanta gazetaro raportis. En la salonoj de Gran Hotel, meze de samideana atmosfero, okazis vespermanĝo kun la partopreno de ĉirkaŭ 60 gelernantoj kaj simpatiantoj al nia afero, inter ili la urbestro kun sia edzino. Brilan paroladon faris S-ano Schmalzriedt, kies vortojn substrekis la tuta ĉeestantaro per longa kaj forta aplaŭdo. Resume: «Esperanto Grupo Moyá» atingis per tiu festo grandan sukceson.

BARCELONO. S-ano Delfi Dalmau, direktoro de la fama lingvolernejo «Belpost» kaj ĉefdelegito de U. E. A., unu monaton antaŭ la pasinta Esperanto-Kongreso, komencis sendi artikolojn pri Esperanto al la urba gazetaro. Bedaŭrinde ne eĉ kvarono de la materialo sendita aperis. Tamen la revuoj «Destino» kaj «Revista» ion publikigis. Al nia redakcio alvenis numero de «Destino» kun bonega artikolo de S-ano Dalmau, kun la

titolo «Einsten kaj Zamenhof», en kiu la aŭtoro tre trafe prezentas al la legantaro la kaŭzojn de la kreo de la internacia lingvo kaj la rolon kiun ĝi povas ludi en la nuna mondo. Per tiuj artikoloj S-ano Dalmau tre faklerte kontribuis, por ke la Barcelona publiko havu konojn pri la celo de Esperanto.

En 31-a de pasinta Majo Esperanto-Grupo «Nigra Monto» aranĝis ekskurson al San Mus (Rubí), kiun partoprenis granda nombro da samideanoj. Okazis la inaŭguro de la grupa standardo, kion oni celebris per artaj fajrajoj, kaj paroladis la prezidanto de la Ekskursa Centro «Montnegre», reprezentanto de la Grupo «Stelo de Paco», lernanto de la Grupo «Nigra Monto» kaj la prezidanto de la sama Grupo.

LA LAGUNA DE TENERIFE. La 29-an de Junio okazis la fina festo de la Esperanto-kurso de la Universitato. Ĉeestis sesdeko da personoj, malgraŭ tio, ke pro la malfruo de tiu kunveno multaj universitataj studentoj, kiuj estis kursanoj, ne povis ĉeesti, ĉar ili jam feriis. Tiu ĉi kurso estas la unua universitata kurso kun oficiala apogo kaj aranĝita de la Universitato mem pere de sia organo, Secretariado de Extensión Universitaria. Entute enskribiĝis 60 lernantoj. La 14-an de Junio, la instruisto S-ano Juan Régulo Pérez faris la oficialan ekzamenon, kiun sukcese pasis 35 lernantoj. La kursofina festo elvolviĝis en vere samideana atmosfero. Ĉeestis la aktivuloj de Santa Cruz de Tenerife, ankaŭ kursanoj de la Universitata kurso, el kiuj elstaras D-ro José Roberto Vivas, Konsulo de Venezuelo, S-ino Elsa Wolff kaj S-roj Pedro Reyes Rodríguez kaj Vicente Pérez Torres. Ankaŭ partoprenis la feston la Dekano de la Filozofia Beletra Fakultato, D-ro E. Serra Rafols, kiu ankaŭ ĉeestis la kurson. Estas mencinde, ke S-ro Angel Pombrol Hernández, samideano kun specialaj ecoj pri simpatio kaj laboremo, multe helpis al S-ano Régulo Pérez en ĉi tiu kurso. Ni publikigas ĉi-apude foton faritan dum la festo.



LA KONGRESO DE KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA

La kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en Jonkoping, Svedujo, 1956, unuanime akceptis sekvantan rezolucion:

Nia kongreso konsideris la gravecon de kristana unueco kaj konscias, ke la nura unueco estas unualoke spirita kaj povas esti atingita nur sur la fundamento de la Dia Vorto t. e. la Sankta Biblio.

Por pli kaj pli realigi unuecon kristanan ni tial instigas la Eklezioјn pli atentikion la Vorto instruas kaj malpli konsideri siajn proprajn tradiciojn. Kun malĝojo ni priparolis la fakton, ke ankoraŭ ekzistas homoj en multaj landoj, kiuj devas suferi pro sia religia kredo aŭ sia rasa deveno. Ni admonas la kristanojn en la tuta mondo kunlabori por ke tiu ĉi situacio kiel eble plej baldaŭ ŝanĝiĝu.

Ni ankaŭ volas atentigi niajn proprajn membrojn kaj ĉiujn aliajn kristanojn pri la bezono de vera monda vekiĝo kaj tiel ni alvokas niajn gefratojn en Kristo al arda preĝado al Dio ke Li en Sia graco sendu tian vekiĝon.

al la paĝo 334

DIVERSAĴOJ

Ĉiu membro de nia Federacio aŭ abonanto de nia bulteno, sendinta solvon de enigmo, gajnos unu poenton. Gajnintoj de 10 poentoj ricevos libropremion. Ni akceptos solvojn ĝis la 15-a de Novembro.

Jenaj samideanoj sendis al ni la solvon de la enigmo n.º 38: P. Naranjo, E. Padrao, A. Escamilla, A. Núñez. Baska Esperanto-Rondo, V. H. Llusera, V. Monsalve, R. Albero, M. Fernández, R. Bastardas kaj S. Roca Rodó. Kaj de la enigmo n.º 39: P. Naranjo, E. Padrao, A. Núñez kaj V. Monsalve.

SOLVO DE LA ENIGMO N.º 38

Horizontale: 2 Palat. 3 Pul. Eĥo. 4 Akcel. 5 Kraĉu. Festo. 6 Maniero. 7 Vila. Lato. 8 Sukcesi. 9 Stopl. Radio. 10 Lojal. 11 Opa. Dis. 12 Paĝio.


Vertikale: 2 Kriis. 3 Por. Tro. 4 Amaso. 5 Plaĉa. uplaP. 6 Kuniklo. 7 ileC. Juĝi. 8 Efemera. 9 Teler. Saldo. 10 Solid. 11 oiT. Ies. 12 Ostro.

SOLVO DE LA ENIGMO N.º 39

La ĉasisto marŝadis laŭ lateroj de triangulo, nordo-sudo, sudo-oriento, oriento-nordo. Rimarku ke, tio nur povas okazi ĉe la arkta regiono. La rifuĝejo, do, staris precize sur la teoria centra punkto de la norda poluso, kaj tie, nur unu koloro estas ebla por la ursa felo: BLANKA.

ENIGMO N.º 41

Krucvorta enigmo, de J. Devís.
Malsupra figuro.



Horizontale: 2 (Rad) Artefarita hararo. 3 (Rad) Fonto de elektra energio. (Rad) Provizi ŝipon per ĉiuj necesaj ŝnuroj, pulioj, k. t. p. kaj ilin aranĝi. 4 Teologo-juristo interpretisto de la Korano. 5 Bleki kiel korvo. Lasta litero de la greka alfabeto. 6 (Inv) Denove blekis kiel ĉevalo. 7 (Rad) Tuŝesplori per la mano. Homa mampinto. 8 Gliptikaĵo kun konkava gravuro. 9 Neatendite morti per akcidento. Difektiĝo de motoro pro nesufiĉa lubrikado. 10 (Rad) Homo komisiita de la aŭtoritatoj por kaŝe observi la preparojn de la malamika armeo. 11 (Rad) Malpuraĵo. (Rad) Enuigi. 12 En ŝakludo, movi samtempe unu el la turoj k la reĝo.

Vertikale: 2 (Rad) Kurba stango alligita al kilo. 3 Prepozicio. Neoficiala sufikso signifanta «laŭ la maniero». 4 (Rad) Fervore celi. 5 Kapti inter la fingroj. Rilata al la korbeto farata de la birdoj por demeti siajn ovojn. 6 (Rad) Moderna maŝino uzata en la presarto. 7 Varmege. (Inv) Suprenglisi en leviĝanta termika fluo. 8 Fajna ŝtofo, teksita el haroj de Angoraj kaproj. 9 Adv. signifanta «krom tio». Tro malrapide agi. 10 Minaĵoj. 11 (Rad) Ske.o. (Rad) Vojeto en arbaro. 12 Valorpapero.

---

el la paĝo 333

Fine ni atentigas la Evangeliajn kristanojn en la mondo pri la graveco de la komuna, facila internacia lingvo, kiu estas politike neŭtrala.

Tian lingvon ni havas en ESPERANTO kaj ni apelacias al ĉiuj kristanaj organizaĵoj, ke ili favoru ĝian disvastiĝon kaj uzadon en la misio kaj en la kristana kunlaboro internacia.

Por Kristana Esperantista
Ligo Internacia,

H. A. de Hoog, prezidanto — *D. de Boer,* sekretario

CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA

Una noticia muy agradable para nosotros, y suponemos lo será igualmente para todos los esperantistas de España, nos place dar hoy a la publicidad: la oficialización de nuestros cursos por correspondencia, que tan admirablemente dirige nuestro querido amigo, Profesor de Esperanto D. Ramón Molera. A continuación reproducimos el texto del acuerdo ministerial:

MINISTERIO DE EDUCACION NACIONAL
COMISARIA DE EXTENSION CULTURAL

Con esta fecha el Excmo. Sr. Ministro me comunica el siguiente acuerdo, adoptado en el expediente de que se hace mérito a continuación:

VISTA la solicitud que con fecha 30 de noviembre de 1955 eleva a este Ministerio de Educación Nacional D. Ramón Molera Pedrals por la que pide autorización de funcionamiento para el Centro privado de Enseñanza por Correspondencia denominado CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO, con domicilio en calle de Forn, 19, Moyá (Barcelona).

VISTO el expediente correspondiente en el que figura toda la documentación exigida en el Decreto de 17 de junio de 1955 y en la Orden Ministerial de 11 de julio del mismo año.

RESULTANDO que D. Ramón Molera Pedrals posee el Diploma de Profesor de Esperanto, extendido por la Sociedad Española de Esperanto y está capacitado para dirigir técnicamente dicho Curso (según los certificados que acompaña de la Delegación Administrativa Provincial de Educación y del Sindicato Nacional de Actividades Diversas).

RESULTANDO que dicho Centro se dedicará a la enseñanza del Esperanto.

CONSIDERANDO que sus métodos pedagógicos y publicitarios no ofrecen inconveniente alguno.

CONSIDERANDO que la instalación material del Centro y su garantía económica responden a las condiciones exigidas en el citado Decreto y en la Orden Ministerial de 11 de julio de 1955.

CONSIDERANDO que los diplomas que ha de conceder este Centro, se ajustan a lo establecido en el artículo 1.° del Decreto de 17 de junio de 1955.

Este Ministerio se ha servido acordar lo siguiente:

1.° Que sea autorizado el funcionamiento de los CURSOS DE ESPERANTO DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO dentro de las condiciones que establece la legislación vigente y de acuerdo con las circunstancias que se acreditan en el expediente del Centro que obra en esta Comisaría.

2.° Que sea clasificado en el Grupo II, según lo prevenido en el artículo 3.° del Decreto de 17 de junio de 1955.

3.° Que se le conceda el derecho al uso de la placa a que se refiere el artículo 7.° del mencionado Decreto con el número SESENTA Y OCHO, con que figura en el Registro Oficial de Centros privados de Enseñanza por Correspondencia, que obra en esta Comisaria de Extensión Cultural.

Lo que me honro en trasladar a Vd. a los efectos consiguientes.
Dios guarde a Vd. muchos años.

Madrid, 25 de junio de 1956.—El Comisario de Extensión Cultural.
Firmado: *Antonio Tena.*
(Hay un sello que dice: Ministerio de Educación Nacional
Comisaría de Extensión Cultural)

Sr. Don Ramón Molera Pedrals, Director de «Cursos de Esperanto por Correspondencia»
MOYA (Barcelona)

LA DUA ĜENERALA KUNSIDO DE H. E. A.

La nacia unuiĝo de blindaj esperantistoj, Hispana Esperanta Aŭroro ((H. E. A.) okazigis sian duan ĝeneralan kunsidon, la 26-an de Julio, vespere, en lernoĉambro de la instrufako de la Nacia Organizaĵo de Hispanaj Blinduloj (O. N. C. E.), en Barcelono. Oni faris jenan rezolucion:

1. Sendi saluttelegramon al la Nacia Estro de O. N. C. E., Moŝta Sinjoro Jozefo Ezquerra Berges.

2. Sendi salutleteron al la 26-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, okazanta en Kopenhago kaj al la Ĝenerala Kunsido de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (L. I. B. E.)

3. Malfermi esperantokurson per korespondado, prenante kiel tekston la lernolibron de Caplliure, kaj plibonigi la nuntempan brajlobulteneton de nia unuiĝo.

4. Propagandi pri Esperanto kiel eble plej ofte en la ĉiumonata brajlogazeto «Relieves», eldonata de O. N. C. E., kiu havas 1500 legantojn.

5. Oficiale danki al Radio Bilbao pro ĝia helpo al la tiea Blindula Esperantoklubo.

DONACOJ AL NIA BULTENO

Antaŭa sumo. .	2.267 pesetoj
M. Daubagna, Vitoria	15 »
J. Perarnau, Tarrasa	30 »
D. Rodríguez, Madrid	25 »
L. A. Ramírez, Vera	15 »
J. López, Cullera	10 »
J. Devís, Valencia	10 »
J. J. Forné, »	5 »
J. Seguer, »	5 »
J. Sanféliz, »	10 »
J. Clement, »	5 »
J. E. Guillem, »	10 »
J. Bosch, »	50 »
A. Candela, »	10 »
E. Miralles, »	10 »
J. Guzmán, »	25 »
A. Pérez, »	10 »
E. Tudela, »	50 »
L. P. Requena »	25 »
R. Herrero, »	25 »
E. Prades, »	25 »
Entute. . .	2.637 pesetoj

Dankon! Ni bezonas imitulojn.

BOLETIN
de la
FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

BULTENO
DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Adreso de la Redakcio kaj Federacio
Str. Pelayo, 7, 1.ª
VALENCIA

Kotizoj de la Federacio
Simpla membro: 15 pesetojn jare
Membro-abonanto: 50 pesetojn jare
Membro-subtenanto: 80 pesetojn jare
La membroj de la du lastaj kategorioj ricevas la Bultenon. La subtenantoj ricevas du ekzemplerojn.
Eksterlanda abono al la Bulteno: 50 pesetojn jare
Monsendojn adresu al:
S-ro Ernesto Hurtado
Str. Pelayo, 7, 1.ª - VALENCIA

PERIS-G. VÍA M. TURIA, 28-VALENCIA